

Persekutoj kontraŭ la Internacia Lingvo en Soveta Unio,
laŭ la historiaj studoj de Ulrich Lins, 2-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 604, 1975.05.07 & 10

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Nin bazante sur la historiaj priskriboj de Ulrich Lins ni prezentas al vi raporteton pri la persekutoj kontraŭ la esperanto-movado fare de la stalinismo. Vi aŭdas la duan prelegon pri tiu temo. La pasintan semajnon ni diris, ke post la Oktobra Revolucio kaj ĝis 1935 la organizaĵo Sovetrespublikara Esperantista Unio (SEU), fondita en 1921, ĝuis oficialan apogon. Ĝia membraro rapide kreskis. Sed subite ĝiaj gvidantoj kaj poste ĉiam pli da esperantistoj estis arestitaj. La akuzo estis, ke ili estis membroj de internacia spiona organizaĵo, kiu sin kaŝas sur la teritorio de USSR sub la nomo de Sovetrespublikara Esperantista Unio.

A.- Por ricevi bildon pri la proksimuma nombro da arestitoj sufiĉas citi la lastan konatan statistikon pri la membraro de SEU. En 1935 estis 5'111 aktivaj membroj, 3'172 gejunuloj kaj 5'954 « amikoj de peresperanta korespondado ». La granda plimulto el tiuj esperantistoj aŭ esperanto-simpatiantoj estis deportitaj en koncentrejojn, kie ili mortis. La persekutoj daŭris de 1935 ĝis 1955, kaj post tiuj jaroj da sufero aŭ timo, ne ĉiuj postvivintaj esperantistoj plene fidis la politikan degelan veteron.

Cl.- Kiam eksterlandanoj malkovris en 1961 la esperantistecon de Stepan Titov, la patro de la kosmonaŭto German Titov, kaj la Universala Kongreso de Esperanto en Harrogate sendis al li gratul-telegramon pro la sukceso de la filo, li komence estis grave ŝokita kaj nur iom post iom konvinkiĝis, ke fine ĉesis la periodo, kiam oni persekutas homojn pro la scio kaj uzo de Esperanto.

A.- Ulrich Lins diras, ke la evoluon, kiu kondukis al la ekstermo de la esperanto-movado en Soveta Unio, oni povas analizi nur en la tuto de la Grandaj Purigoj sub Stalin.

Cl.- La internaciaj revoluciuloj, kiuj ĉirkaŭis Leninon, estis iom post iom anstataŭitaj de teknokratoj, kies horizonto ne etendiĝis ekster Soveta Unio. Ili konsideris Stalinon kiel sian pensmodelon. Jam fine de la dudekaj jaroj la intereso de la soveta ŝtato superpezis tiujn de monda revolucio. Laŭ Stalin la sorto de la antaŭvidita monda revolucio dependis unuavice de la forto de Soveta Unio. Kiu pretendis defendi la internacian revolucion movadon ne defendante Sovetan Union, tiu neeviteble transiris en la tendaron de la malamiko de la monda revolucio.

A.- En la kazo de Sovetrespublikara Esperantista Unio (SEU), tiu nova situacio unue influis ĝiajn rilatojn kun Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT). Al tiu ĉi organizaĵo, kiu ĉiam insistis pri la plurismo de la socialismaj skoloj, kun utiligo de esperanto por la klasbatalo kiel unuiga elemento, SEU ne plu povis aparteni. La ekziĝo de SEU el SAT iĝis neevitebla, kaj la rompo plirapidigis Lanti mem per sia ĉiam pli forta pledo por sennacismo, kiu estas, laŭ lia propra konfeso, ne harmoniigebla kun marksismo.

Cl.- Sed kiam la soveta esperanto-movado subite malaperis en 1937/1938, SEU jam estis likvidinta ĉiujn rilatojn kun SAT kaj kun aliaj nekomunismaj organizaĵoj, kaj oni do ne povas facile atribui la kialojn de ĝia pereco al nesufiĉa adapto al stalinismo, nek al la *propra kulpo* de la gvidantoj, pri kies fideleco, eĉ troa, al la reĝimo ne ekzistas dubo.

A.- Iuj opinias, ke la persekutoj originis en la viglaj lingvistikaj diskutoj, kiujn interalie partoprenis Drezen, la prezidanto de SEU. La teorioj de la lingvisto Nikolaj Jakovleviĉ Marr (1865-1934) estis apogitaj de Stalin, kaj, post la morto de Marr, liaj disĉiploj, sciante malantaŭ si la plenan apogon de la reĝimo, denunciis ĉiujn, kiuj kontestis ilian monopolon en la soveta lingvistiko. Kiuj ne plene akordiĝis kun la marrismo, al tiuj restis nur unu alternativo : aŭ silento aŭ persekutoj. La brila lingvisto E. D. Polivanov, ekzemple, kiu delonge forte kritikis la teoriojn de Marr, estis arestita en marto 1937 kaj mortis en januaro 1938. Siatempe ankaŭ Drezen faris kritikojn kontraŭ la teorioj de Marr, kaj ne estas kontesteble, ke la persekutoj kontraŭ la Internacia Lingvo okazis en periodo, kiam absolute regis tiu lingvistika skolo, kies patro estis Marr. Sed Ulrich Lins ne opinias, ke la subprema politiko kontraŭ la esperantistoj, al kiu transiris Stalin, povas esti klarigata per nuraj lingvaj kaŭzoj. La veraj kaŭzoj estas politikaj.

Cl.- La perado kaj kontrolado de korespondo inter sovetaĵ kaj alilandaj proletoj estis la ĉefa aktiveco, per kiu SEU vivtenis sin. Laŭ ĝiaj direktivoj, sovetaĵ esperantistoj skribis stereotipajn leterojn al esterlando por informi siajn samklasanojn en kapitalismaj landoj pri la konstruado de socialismo en Soveta Unio, sed difinita elemento de spontano ĉiam konserviĝis en tiu korespondado, ĉar la leteramikoj menciis la krudajn neperfektaĵojn de sia prolet-kamparana ŝtato, dum eksterlandanoj donis nefiltritan priskribon de la vivkondiĉoj en siaj landoj, kiu ne multe taŭgis por apogi la propagandan tezon, ke kapitalismo staras sur la sojlo de kolapso.

A.- Kelkaj sovetaĵ esperantistoj eĉ tute senkaŝe skribis pri la stalinismaj ekscesoj en leteroj al siaj korespondantoj en eksterlando. Kiam tiaj sciigoj atingis eksterlandajn konvinkitajn komunistojn, tiuj opiniante, ke tiele nur povas skribi *kontraŭrevoluciuloj*, resendis la leteron *informcele* al SEU aŭ eĉ al la ŝtata soveta polico.

Cl.- Ĝuste tiu fakto, ke Esperanto servis ne nur kiel unudirekta kanalo de informoj el Soveta Unio, plej kredeble kaŭzis la subpremon de la esperanto-movado en la uragano de la Granda Purigo.

A.- La venontan semajnon ni legos al vi tesktojn, kiuj fortikigas tiun tezon.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!